

-Produktkontrakto-

Inter la artisto/kantisto
nomo de la artisto :
reprezentita de :
funkcio :
adreso kompleta :
Kodo kaj urbo :
Lando :
tel/faks :
reto :

kaj la diskeldonejo (*Nomo de la eldonejo*)
reprezentita de :
funkcio :
adreso :
Kodo kaj urbo
Lando
tel :
faks :
reto :
TTTejo :

Estis interkonsentitaj ambaŭflanke jenaj kondiĉoj:

-1. La eldonejo (*Nomo de la eldonejo*) produktas latitolan albumon "*Titolo de la albumo*" de la artisto *Nomo de la artisto aŭ bando* .

Tio signifas ke la eldonejo pagas ĉiujn produktokostojn : surbendigo en studio, salajro, vojaĝkostoj kaj gastigado de la muzikistoj, mastrigo de la verko, aŭtorrajtoj, kostoj de la grafismo de la libreto kaj banderolo, eldono de ekzempleroj por la unua eldono kaj la varbkostoj.

-2. La artisto rezignas pri la tantiemoj de la unua eldono.

-3. (*Nomo de la eldonejo*) kaj la artisto « *Nomo de la artisto aŭ bando*

 strebos realigi surbendigon kies teknikaj, artaj kaj lingvaj kvalitoj atingos la bezonatajn kondiĉojn por altkvalita produktado.

-4. La surbendigo apartenas al la produktisto (*Nomo de la eldonejo*)

(*Nomo de la eldonejo*) daŭre rajtas publikigi kantojn varbcele en la interreto kun komuna interkonsento

Por tiu celo estos elektitaj 3 (tri) titoloj.

Neniu rajto estos donita por kromaj titoloj, krome se estas establita aparta kontrakto.

-5. (*Nomo de la eldonejo*), ne povas uzi tiun verkon sur alia fonogramo sen averti la artiston. Tiu kontrakto donas neniun ekskluzivecon por eldono aŭ produktado alian .

-6. KD (kompaktdisko) estos la sonportilo.

-7. La unua eldonkvanto estos minimume KD-oj.

-8. La artisto (Nomo de la artisto) interkonsente kun (*Nomo de la eldonejo*) mem elektos la kovrilon kaj enhavon de la KD-libreto. En ĝi troviĝos la tekstoj de la kantoj en esperanto. Sur la disko kaj ujo aperos la logotipo de (*Nomo de la eldonejo*) kaj ties referencoj

-9. La artisto (Nomo de la artisto) interkonsente kun (*Nomo de la eldonejo*) mem decidis pri la elekto kaj ordo de la kantitoloj en la albumo.

-10. La artisto (Nomo de la artisto) ricevos po□.. senpagajn ekzemplerojn de la albumo.

-11. La artisto/kantisto profitos favoran tarifon se li deziras pliajn ekzemplerojn por disvendi aŭ donaci : KI (..... SI) + sendokostoj.

-12. (*Nomo de la eldonejo*) rezervasekzemplerojn de la unua eldono por la varbado en la gazetaro (ne disvendataj) kiun (*Nomo de la eldonejo*) mem faras. Kaj poekzempleroj de la sekvaj eldonoj.

-13. Vendo-prezoj aplikataj

-a) La alpublika tarifo (katalogo de (*Nomo de la eldonejo*))

estas Sen Imposto, kun imposto (AVI) + sendokostoj.

-b) Estas konsentita rabato (pogranda prezo) por la libroservoj kiuj mendas ekde 3 ekzemplerojn (tio estas senimposta [kun AVI] + sendokostoj)

-c) La muzikbando povas profiti favoran tarifon (definita en la punkto 11)

-14. Financoj

Okaze de la unua eldono la artisto rezignas pri la tantiemoj kiel indikite en punkto 2.

Ekde la dua eldono

Du eblecoj :

a) La artisto ricevos 10% de tantiemoj de la disvenditaj diskoj laŭ la pogranda prezo senimposta.

Tio signifas ke disko disvendata al la publiko sen rabato po SI), kostas pogradpreze sen AVI (AVI =%).

En via kazo vi ricevos por ĉiu disvendita KD po 10% de tio estas

Tiuj tantiemoj estos pagataj nur post vendo de la dua eldono kaj de la sekvaj eldonoj (se estos).

b) Kiel pago de la tantiemoj anstataŭ monon, eblas ricevi ekvivalenton de tiu sumo per diskoj kalkulita laŭ la pogranda prezo SI surbaze de KD-oj disvenditaj; tio estas KoDiskoj

-15. Reeldono

Okaze ke dua, tria aŭ eĉ plia eldono estos bezonataj, la artisto donas la rajton al (*Nomo de la eldonejo*) por ilin fari. La artisto estos informita pri la precizaj eldonkvantoj de la dua kaj, tria aŭ pliaj eventualaj eldonoj.

La kondiĉoj de la reeldono restos samaj kiel tiuj de la dua eldono. La artisto indikos fine de la kontrakto kiamaniere la tantiemoj devas esti pagitaj (ĉu per mono je elĉerpiĝo de la dua eldono ĉu per diskoj tuj je apero de la dua eldono).

-16. Garantio de la artisto

La artisto garantias ke li posedas la uzorajtojn de la kantoj de aliaj artistoj troviĝantaj sur tiu albumo.

Por la titoloj kies originoj devenas el aliaj artistoj (*Nomo de la eldonejo*) postulas kopion de la kopirajtaj permesoj subskribitaj de la originaj komponistoj kaj permesoj de la diskeldonejoj se la koncernaj muzikaĵoj estis eldonitaj.

Sen tiuj permesoj (*Nomo de la eldonejo*) rifuzos aperigi la koncernajn kantojn sur la albumo.

-17. En kazo de malapero de (Nomo de la produktejo/eldonejo)

Se (*Nomo de la eldonejo*) malaperus la artisto ricevus la restantan stokon de la eldonitaj diskoj kaj pagus ilin laŭ produkta kosto + la sendokostoj).

Kaj la artisto rehavos ĉiujn rajtojn de tiu surbendigo.

La diskeldonejo (*Nomo de la eldonejo*)

kaj la artisto/kantisto : (*Nomo de la artisto*)

Interkonsentas pri ĉiuj kondiĉoj de tiu ĉi kontrakto.

Por la pago de la tantiemoj de la dua eldono la bando elektas :

[] ricevi la monon post la vendo de la unua eldono.

[] ricevidiskojn tuj post la apero.

(krucigu la deziratan elekton)

Tiu ĉi kontrakto konsistas el tri (3) paĝoj plus farita en du (2) ekzempleroj.

Nome de (*Nomo de la produktejo/eldonejo*)

Legite kaj aprobite

Loko :

Dato :

Subskribo kaj stampo:

Nome de la artisto :

Legite kaj aprobite

Loko :

Dato :

Subskribo :